BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

BOLETIM Nº 27 | JULHO DE 1977 | ÓRGÃO OFICIAL DO B.K.E.

Redação : MARIA ALMADA

## LA XII SEMINARIO DE ESPERANTO

En Santos (SP) estis realigita ankoraŭ unu plia Seminario de Esperanto kun granda sukceso.

La Kultura Kooperativo de Esperantistoj, el Rio de Janeiro, kune kun Brazila Konsilantaro de Esperanto kaj Centro Esperantista de Santos denove pruvis, ke por propagandi pri nia lingvo sufiĉas unuiĝi kaj kunlabori.

La programo de la Seminario estis realigita jene:

Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 350 personoj el pluraj ŝtatoj de la tuta lando. Je la 20h-30 de la 14-a de julio okazis la inaŭguro de la XII-a Brazila Seminario de Esperanto, farita de nia prezidanto, ĝin partopreninte la reprezentanto de la urbestro D-ro Antonio Alberto Real kaj D-ro Emilio Justo, deputito ŝtata, kiu faris belegan paroladon.

La evento estis disvastigita pere de radio kaj lokaj gazetoj, sed niaj diligentaj vicprezidantoj eluzis la okazon kaj tra la tuta Brazilo oni informis la popolon pri nia movado.

En la belega klubejo de Associação Atlética Banco do Brasil, kiu allogis la ĉeestantaron, realiĝis ĉiuj laboroj. Eĉ la restoracio, kiu tie funkcias bonvolis per speciala prezo liveri manĝaĵon al preskaŭ ĉiuj, kiuj partoprenis la Seminarion.

Estis decidite, ke la ĉefdelegito de UEA, nia vicprezidanto Giuseppe Grattapaglia, en la kadro de la Universala Kongreso de Esperanto, realiĝonta en Islando, pritraktu la Universalan Kongreson de Esperanto en Brazilo en la jaro 1981-a.

La geedzoj Grattapaglia reprezentos Brazilon en Islando.

Laŭ la programo estis inaŭgurita la busto de Zamenhof en la Placo João Barbalho, al kies ceremonio ĉeestis multaj personoj.

Laŭ peto de nia Prezidanto, faris paroladon inaŭgurante la buston, la federacia deputito Athié Jorge Cury, kiu per kortuŝaj vortoj reliefigis la figuron de la kreinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, kies busto memorigos la Majstron en Santos.

Vespere prezentiĝis la Grupo Taracon kun granda sukceso, organizita de Alan Romero. La luditaj muzikoj estis latinamerikaj, kiuj plaĉis al ĉiuj.

Estis inaŭgurita en "Prodesan" ekspozicio de Sam-ino Maria de Lurdes Delgado, kies patrono estis S-ino Maria Almada.

Pluraj prelegintoj de nordo ĝis sudo riĉigis la Seminarion per interesaj temoj.

En belega salono de la AABB oni prezentis ekspozicion de valoraj pentraĵoj de du pentristioj: Helena Almeida Almada kaj ŝia filino Rosely Almada Prado, kies modernaj pentraĵoj vekis grandan sukceson. Same gajnis laŭdojn la klasikaj pentraĵoj de Helena.

Kun intenco kolekti monon por la Informa Bulteno de BKE, S-ino Maria Almada organizis bazaron. Helpis ŝin S-ino Esther Ferreira Queiroz, Anna Maria Mundel, Maria de Lurdes Delgado, S-ino Iara; tiu ĉi

kaj S-ino Esther, kvankam ne estante esperantistinoj, multe helpis. Krom ili, ni deziras mencii la du fratinojn Cristina kaj Beatriz Arnaldo kaj Ieda.

Al ĉiuj voluntuloj ni kore dankas la valoran laboron. Sen ilia helpo ne realiĝus la bonsukcesa bazaro.

Okazis ankaŭ la kunveno de la estraro de BKE, kaj tralegint e la respondojn ricevitajn de la voĉdonintoj, oni konstatis, ke la balotado konfirmis la nunan estraron kun laŭdo, do la direktoraro por nova periodo, ĝis la jaro 1980-a estas:

Prezidanto: – Francisco de Souza Almada.

Vicprezidanto Ekzekutiva: – Elvira Fontes.

Ĝenerala Sekretario: – Nelson Pereira de Souza.

Financa Direktoro: – Carlos Augusto Siqueira da Cunha.

Ni gratulas la reeletitojn kaj deziras daŭrigon de la sukceso ĝis nun atingita de tiu laborema estraro por la bono de la Konsilantaro.

Grava decido okazis ankaŭ en la kadro de la Seminario: kun aprobo de la urbestro de Marilia (SP), nia vicprezidanto Wilson Ferreira Martins invitis la I-an Latinamerikan Kongreson de Esperanto por Brazilo, realiĝonta en tiu urbo en la venonta jaro 1978-a, de la 17-a ĝis la 22-a de julio.

Jen la direktoraro, kiu pritratos la eventon:

Prezidanto: – Wilson Ferreira Martins, de BKE

Vicprezidanto: – F. S. Almada, de BKE

Vicprezidanto: – D-ro Walter A. Francini, de APE kaj BKE

Ĝenerala Kunordiganto: – D-ro Braz Cosenza, de KKE kaj BKE

Komitatanoj:

Sekretarioj: – Rio de Janeiro, Prof-ino Cedilha Neto kaj Estela de Jesus.

Sekretarioj: – Marilia . . . . . . Miguel Silva (Encarregado)

Kasisto: - - - Emilia Castilho – Rio de Janeiro ;

Informado: – Rio de Janeiro – Amarilio Carvalho

Gastigado: – Rio de Janeiro - João Marques – Marília - - - - Gabriel Ferreira e Terencio Bertolini

Helpantoj: - - - Fausto, Coruopos, Elma – Hersilia Valverde - Elvira Fontes (APE) kaj BKE (ambaŭ)

Ĉijare la junularo plene aktivis dum la Seminario, dank'al nia juna pianisto André Luiz de Souza. Ili prezentis esperantajn muzikojn, kiuj estis arde kaj sukcese aplaŭditaj de la ĉeestantaro.

Oficiale estis aljuĝitaj tri premioj. La kvaran premion (eksterordinaran) donacis Centro Esperantista de Santos, kaj ĝin gajnis nia juna samideano Vicente Caetano el Gojanio (GO), pere de la muziko "Printempa Kantado". Krom tio, eksterplanite estis aljuĝita premio por la plej bona prononco.

Ni kore gratulas niajn kantistojn kaj muzikistojn. Aparte ni devas laŭdi kun merito la junan s-anon Pitta, el Itanhaém (SP), kies ludado estis vere agrabla kaj plaĉa.

La junulinoj estis ankaŭ diligentaj kaj klopodis akiri monon por BEJO. La ĉijara Fraŭlino Bejo" estas nia ĉarma kaj simpatia Eliana Corrêa, el San-Paŭlo. Ŝi sukcesis vendi pli ol mil biletojn. Ni kore gratulas ŝin kaj esperas, ke en la venonta jaro estu elektita alia same ĉarma kaj klopodema junulino.

Nia redaktorino kaj vicprezidantino de BKE kaj de la XII Seminario de Esperanto salutis la ĉeestantaron pere de la jenaj versoj:

**BONVENON EN SANTOS!**

Kie ora suno bruligas la valon,
nokte pala luno kisetas la maron,
sur la verda monto milda vento ĥuŝas
en la maro pie la insulo kuŝas.

Estas ĝi mirinda, benita de Dio,
havas gravan rolon en la historio.
kiun la fremduloj glorigi ne lantis
Vicente Carvalho pri ĝi dolĉe kantis.

Neniu forgesu, la kroniko notu,
naskiĝis ĉi tie Rui Ribeiro Couto.
Nun ĝi estas kara pro ĝia beleco
en skalava epoko pro la libereco.

La progres' atestas pri ĝia futuro,
ĉi tie floras nun la monda kulturo.
Pro tio fieras, pleniĝis je vantoj,
iĝis renkontejo de la esperantoj.

Vi el centro, sudo, vi ĉiuj el nordo,
estas malfermita por vi ĉiu pordo.
Pri tiu ĉi tero, gentoj himnon kantos
estu bonvenintaj en mondfama Santos!

Maria Almada

Santos, la 14-an de julio 1977.

✩ ✩ ✩ ✩ ✩

Nia prezidanto ricevis la jenajn telegramojn:

"Ao Sr. Francisco de Souza Almada, presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto - Rua Galeão Carvalhal, 31-73.

Agradecendo o honroso convite para as solenidades do 12ºSeminario Brasileiro de Esperanto, formulo os meus melhores votos para pleno êxito do conclave. Cordiais saudações. — Elmo Serejo Farias — Governador do Distrito Federal".

✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩

"Francisco de Souza Almada, Conselho Brasileiro de Esperanto, etc. Agradeço amabilidade convite Décimo Segundo Seminário de Esperanto, esperando tenha alcançado objetivos propostos. Cordiais saudações. — Marcos Tamoyo — Prefeito do Rio de Janeiro".

Ilmo. Sr. Francisco de Souza Almada, presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto, etc. — "Senhor Governador Paulo Egydio Martins agradece convite, recebido último quinze de julho, para 12º Seminário Brasileiro de Esperanto, realizado nessa localidade, e envia cumprimentos promotores evento. Atenciosas saudações. Mário Leonel — Subchefe da Casa Civil".

✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩

**SÃO PAULO (SP) — Nosso presidente recebeu a seguinte mensagem, datada de 20 do corrente: "Sr. Presidente, com meus cumprimentos, agradeço-lhe a gentileza do convite para o 12º Seminário Brasileiro de Esperanto. Cordialmente - José Bonifácio Coutinho Nogueira - Secretário da Educação" (do Govêrno de S. Paulo).**

✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩

Ainda, do sr. Deputado Jorge Fernandes da Silva, 1º Secretário da Assembléia Legislativa de S.Paulo, recebeu nosso presidente a seguinte mensagem:
"Ao Ilustríssimo Senhor Francisco de Souza Almada, Digníssimo Presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto.

Tenho a honra de levar ao conhecimento de Vossa Senhoria haver apresentado ao nobre Deputado Osiro Silveira o Requerimento nº 1178, de 1977, em virtude do qual se consignou na Ata dos nossos trabalhos um voto de congratulações com a Associação Paulista de Esperanto, pela inauguração de sua nova sede, nesta Capital.

Consubstanciando o pensamento desta Casa, a referida propositura mereceu inserção, nos termos dos inclusos avulsos, no "Diário da Assembléia" de 08 deste.

Valho-me do ensejo para externar a Vossa Senhoria os protestos de minha elevada consideração".

Deputado Jorge Fernandes da Silva
1º Secretário

## CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

CGC 00 406 504/001 06 – Brasília
Distrito Federal

### BALANÇO GERAL EM 30/06/77

**ATIVO**

I – **Disponível**

| | |
|---|---|
| CAIXA | |
| Em Brasília (DF) ....... | 84,99 |
| Em Santos (SP) ....... | 784,40 |
| Soma .......... | 869,39 |
| BANCOS .......... | 1.851,02 |
| Disp.Total ...... | 2.720,41 |

II – **Realizável**

| | |
|---|---|
| BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO.......... | 910,00 |

III – **Imobilizado**

| | |
|---|---|
| IMPRESSOS E OBJETOS DE ESCRITÓRIO ........ | 437,75 |

IV – **Pendente**

| | |
|---|---|
| DESPESAS GERAIS ... | 3.773,40 |
| Soma Total ..... | 7.841,56 |

**PASSIVO**

I – **Não Exigível**

| | |
|---|---|
| FUNDO SOCIAL ..... | 3.826,56 |

II – **Pendente**

| | |
|---|---|
| CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS RECEBIDAS ........ | 4.015,00 |
| Soma Total...... | 7.841,56 |

**Brasília (DF), 30 de junho de 1977**
**CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO**
a) Carlos Augusto S. da Cunha
Tesoureiro
CRC. SP 43051 - S. DE 360

☆ ☆ ☆ ☆ ☆

### MONDONACOJ POR LA BULTENO EN JULIO

Ni ricevis kaj el tuta koro dankas la jenajn sumojn de:

| | |
|---|---|
| Prof-ro Evandes Barbosa ... | Cr$ 50,00 |
| en la nomo de Esperanto Societo Pelotas; | |
| Antonio Carlos Cortes ....... | 200,00 |
| Anna Maria Mundel ......... | 100,00 |
| Carlos H. Dionisio .......... | 200,00 |
| Coleta na A.A.B.B. - diversos .. | 710,00 |
| Fraũlino Krieger - P.Alegre ... | 500,00 |
| Maria Encarnação Moreno .... | 100,00 |
| Amikino de Esperanto ....... | 100,00 |
| Bazar - vendido no AABB .... | 2.030,00 |
| Sumo ........ | 3.790,00 |

### LINGVAJ PRIKOMENTOJ
(Daũrigo)

Troviĝas en la libro analizita: "Kaj ĝuste tion ankaŭ faras Petro" anstataŭ "Kaj ĝuste tion faras ankaŭ Petro". – "Etelka ankaŭ faras donacojn al Petro" anst. "Etelka faras donacojn andaŭ al Petro". Kvankam mia intenco ne estas recenzi tiun libron oni devas akcenti, ke ĝi estas verkita ege supraĵe entute neekvilibrita ekzemple la adverbo "ankaŭ" ripetiĝas pli ol dekfoje dum aliaj adverboj estas preterlasitaj, oni ilin apenaŭ mencias, estus pli bone la adverbo "ankaŭ" du tri foje klarigi kaj doni lokon ankaŭ al aliaj. Estos eble utile en posta leciono analizi la frazon "Ĝi (temas pri poŝtranĉilo) taŭgas por diversaj laboretoj..." La vorto laboreto estas malĝusta, devas esti "etlaboroj". Per tiu ĉi neordinara pseŭdoprefiksa kunmeto oni reliefigas la abstraktecon kaj metaforecon de la eteco. "Etburĝo" ne estas malaltstatura burĝo, sed "homo kies burĝeco estas malaltranga aŭ "etranga". "Etulo" = Malgrandulo. "Etigi" = malgrandigi. Alia tiurilata ekzemplo: "La tajloro diras: – Mi estas la ĉeftajloro. Mi pritranĉos la drapon, mi faros la ĉeflaboron kaj vi, junulo, vi faros la etlaborojn: alkudri la butonojn, senfaldenigi la jam pretan veston ktp. La etlaboroj povas esti kvante tre ampleksaj sed tamen ili meritas nomiĝi: "etlaboroj" kaj neniel "laboretoj". Bone estas diri "tiun ĉi ponton ni trapasos etpaŝe; etkomerco; etanima; ktp. Ni diru: "Nia propagando ne estos "grandskala" sed "etskala". La vorto "etaĝa" por junulo. Bone estas diri: "Kia estas via aĝo?" aŭ "Kian aĝon vi havas?" "En la aĝo de 8 tagoj", aŭ "Kiom li aĝas?

Plenaĝa. Do ni povas uzi "esti" aŭ "havi". Io simila estas pri jenaj frazoj: "Kio estas via nomo?" C. Rosetti – uzas en Kredu min Sinjorino. "Kia estas via nomo?" uzas Andreo Ĉe. Do oni havas okazon elekti laŭvole.

### GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn, kaj elkore dankas, ne nur la sciigojn pri la 12-a Seminario, sed ankaŭ pro la aperigo de gravaj artikoloj pri la Esperanto-movado:

"A Tribuna", de Santos; "Cidade de Santos"; "O Democrata"; "Indaiatuba"; "Correio Fraterno do ABC"; "Diário de Notícias"; "Matutino Popular", de Caçapava; "Jornal da Manhã", de Ilhéus; "Tribuna dos Municípios",de Salvador;"O Taubatéano",de Taubaté; "Diário de Jacareí"; "Plataforma"; "A Candeia"; "Diário de Taubaté".

Preskaŭ ĉiuj, kiuj partoprenis la Seminarion laŭdis la bonegajn artikolojn publikigitajn de tiuj gazetoj.

**CAMPOS (RJ)** – La gazeto "A Notícia" el Campos aperigis anoncon pri la enskriboĝo por Esperanto-kurso, kiu funkcias en la Librovendejo "André Luiz", strato "Vigário João Carlos, 59 - teretaĝo 1. La kursgvidanto estas nia vicprezidantino Prof. Maria Luiza Bilot. Ni deziras sukceson al nia samideanino.

### ESPERANTO ELEMENTAR

Grandskale estas vendata la libro "Esperanto Elementar" de nia prezidanto, kies profito estas por helpi la aperadon de nia Informa Bulteno. Ĝi kostas po Cr$ 10,00 kaj por kvanto de pli ol 20 ekzempleroj estas rabato de 20%. Oni mendu rekte de F. S. Almada - Strato Galeão Carvalhal, 31 apto. 73 -11.100 - Santos (SP).

Ĝi estas vendata ankaŭ de Kultura Kooperativo de Esperantistoj CEP 20.000 - Rio de Janeiro, Caixa Postal Nº 1887-ZC 00 kaj en Santos: - Livraria "Pingo de Luz" Rua Marechal Deodoro, 11 - CEP 11.100 Santos (SP).

**"Livraria Esperanto"** ankaŭ vendas "Esperanto Elementar" kaj ĝi estas en la "Galeria da Rua S.Bento, 466 - Loja Nº3, proksime al "Metrô", en São Paulo..

SPIRITA ELDONA SOCIETO
"F. V. LORENZ"
Rua S. Braz nº 460 - Poŝtkesto 3133
20.000 - Rio de Janeiro (RJ)
BRAZILO

### BILANCETO PRI LA DUA TRIMESTRO 1977

**ENSPEZOJ:**

| | |
|---|---|
| Antaŭa saldo | 2.555,42 |
| Kotizoj | 2.344,58 |
| Donacoj | 4.085,20 |
| Sumo | 8.985,20 |

**ELSPEZOJ:**

| | |
|---|---|
| Libroj aĉetitaj | 2.241,00 |
| Libroj eldonitaj | 4.000,00 |
| Poŝtmarkoj | 646,90 |
| Cirkuleroj | 160,00 |
| Paperaĵoj | 368,70 |
| Posta saldo | 1.568,60 |
| Sumo | 8.985,20 |

Jen la publikigita bilanceto de la Estraro en la 30-a de junio, 1977, kiun ni represigas, ĝin diskonigante inter niajn BKE - anojn.

✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩

### NI KONDOLENCAS

La 20-an de julio forpasis en San-Paŭlo nia konata samideano kaj skulptisto Prof-ro Laszlo Zinner, kiu ankaŭ estis nia vicprezidanto.

Li naskiĝis en Hungarujo, kie li lernis Esperanton kun Baghy Gyula kaj aliaj konataj hungaraj esperantistoj.

Kiel skulptisto, Zinner siatempe vivis en Belgio, Francujo, Portugalujo, Afriko kaj fine li enmigris Brasilon. Dum liaj vojaĝoj li lernis plurajn lingvojn, sed ĉiam li volonte uzis Esperanton.

En San-Paŭlo li edziĝis kaj iĝis profesoro en la tre konata Fakultato Mackenzie kiel skulptisto. Li neniam ĉesis labori por la Esperanto-Movado.

Dum longaj jaroj li estis organizanto kaj direktoro de kulturkunvenoj.

Li estis prezidanto de la 4-a Semina-

rio de Esperanto en la jaro 1969-a, okazinta en San-Paŭlo.

Li fondis esperantan societon en Mackenzie, kie li gvidis diversajn kursojn.

Akurate li ĉiam ĉeestis ĉiujn seminariojn, krom ĉi tiu lasta por li, okazinta en Santos, post kiu ni ricevis la malĝojan sciigon.

Sendube Esperanto perdis senlacan kunlaboranton kaj ni nian karan vicprezidanton.

La Esperanto-movado en Brazilo funebras pro la malapero de ĝia tre ŝatata membro. Ni kondolencas lian Familion - edzinon kaj gefilojn.

✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰

BRAZILIO (FD)

Estas fondata speciala librovendejo en nia ĉefurbo Brazilio, kiu senprofite disvendos librojn naciajn kaj eksterlandajn.

La eksterlandajn librojn ni ne trovas facile, pro tio kelkaj samideanoj decidis organizi firmon, kiu solvos tiun problemon, kiun ni ĉiuj sentas: mankas utilaj komunikiloj. La eksterlandaj libroj ne estas acêteblaj. Novaj verkoj ne aperas akurate kaj por helpi la samideanaron oni kolektis pli ol Cr$ 12.000,00 por akiri librojn kaj tiel ni post nelonga atendado povos havigi bonajn librojn kaj tralegi la plej modernajn verkojn de gravaj esperantistoj.

Ni gratulas al niaj vicprezidantoj el Brazilio, kiuj malavare kontribuis kaj daŭre helpas al la organizantoj. Ni aperigos sciigojn pri la librovendejo kaj ĝian adreson kiam ĝi ekfunkcios.

✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰

JAGUARÃO (RS) – La gazeto "A Folha" aperigis interesan artikolon de nia samideano Mario Prestinari pri la XII Seminario de Esperanto.

Estas interese legi ĉiam pli kaj pli artikolojn pri Esperanto en nacilingvaj gazetoj, tiel la popolo ekscias pri la movado de la internacia lingvo tra la mondo.

La aperintaj sciigoj estas unu el la plej gravaj manieroj propagandi pri nia kara afero. Ni gratulas niajn klopodemajn gesamideanojn, kiuj tiamaniere puŝas la ĉaron antaŭen por ke ni venku la barojn ankoraŭ akzistantajn.

SALVE BRASIL!

Dr. Eduardo Marinho Alves de Moura

Encantadora Terra do Ocidente,
Paraíso, Conforto e tôda Paz,
É sempre grande em tudo que ela faz,
É vasta, é rica, é linda, é diligente.

Um lar feliz de encantadora gente;
Mundo alegre, seguro e eficaz,
O Brasil é potência mui capaz
E o Brasileiro, um homem bem contente.

Uma só Patria fomos já um dia
Quando bela despontava a aurora
E o mundo compreendeu-te logo então.

Podemos afirmar em harmonia:
Se sempre longe estás de nós agora,
Vives contudo em nosso coração!

Lisboa. (Elesperantigis F. S. Almada)

✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO – Societo Zaminhof. – Ni ricevis raporton de D-ro Humphrey Tonkin pri la okazaĵoj rilataj la Societo Zamenhof, kiun ni tutkore dankas. Ĝi finiĝas per la sekvantaj vortoj: "Kaj fine, pri nia Societo Zamenhof... Fine de 1976 ni havis entute 219 membrojn. Por 1977 ni jam atingis 215. Do, plej verŝajne nia membronombro restos almenaŭ stabila, kaj eventuale iomete kreskos ĉijare. Dankegon pro tiu rezulto!

Jen la laŭlanda statistiko ĝis la fino de majo: - Arĝentino 2; aŭstralio 2; Belgio 11; Brazilo 4; Britujo 6; Danlando 4; Finnlando 12; Francujo 4; FRG 19; Hispanujo 4; Israelo 1; Italujo 1; Japanujo 2; Kanado 5; Mek. 1; Nederlando 16; Norvegujo 8; Novz 1; Portugalujo 1; Svedujo 45; Svisujo 6; US 59.

Kiel ni vidas Usono kaj Svedujo kontribuas nepre la plej grandan nombron. Gratulojn al niaj membroj en tiuj landoj, kaj ankaŭ al Germanujo (FRG), Nederlando, Finnlando kaj Belgio, kiuj ankaŭ kontribuas bele. Se via lando ne troviĝas inter la unuaj, ek al varbado...! Nia Societo vere signife kontribuas al la fortigo de la Asocio kaj nia estonta prospero. Dankon al vi ĉiuj! Kaj ĝis revido en Rejkaviko! Humphrey Tonkin".